

Geografia nomenklaturu, 8-a parto
Influo de Volapük
Claude Gacond, 289-a radioprelego, 1969.04.23 & 26

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Ni vin atentigis pri la graveco de la debato malfermita de Tibor Sekelj per la eldono de *Mondmapo* kaj de propono de geografia nomenklaturu.

A.- Oni malfacile komprenas la zamenhofan uzon de la sufikso **uj**, se oni forgesas rigardi al la lingvo Volapük.

Cl.- Ni ne forgesu, ke la lingvo Volapük estis sufiĉe disvastiĝinta, kiam Zamenhof verkadis sian broŝuron *Lingvo internacia de Doktoro Esperanto*. Pro tio li ne povis ne rigardi al la lingvo de Schleyer.

A.- La pasintan jaron dum studo pri la lingvo Volapük ni havis la okazon demonstri, ke tre verŝajne nia korelativa tabelo estas pruntita el la lingvo de Schleyer. Hodiaŭ ni rimarkos alian eblan influon de Schleyer super Zamenhof.

Cl.- Kiam oni malfermas jarlibron kiel la organon *Yelabuk pedipedelas*, kiu donis la adresojn de la posedantoj de diplomo pri Volapük, oni tuj rimarkas, ke en la lingvo de Schleyer la landnomoj finiĝas per **än**. Belgio estas **Beljän**; Portugalio **Bodugän**; Danlando **Dän**; Germanio **Deütän**; Alzaco **Elsasän**; Francio **Flentän**; Grekio **Glikän**; Svislando **Jveizän**.

A.- Tiu sufikso **än** estas mallongigo de la radiko **län**, kiu korespondas al nia vorto lando. Fakte en Volapük oni diris por tiuj landnomoj **Belgland**, **Portugalland**, **Danland**, **Germanland**, **Alzacland**, **Francland**, **Grekland**, **Svisland**, se oni volas fari komparon kun niaj propraj radikoj.

Cl.- Zamenhof, kiu serĉis por la tiam forĝata lingvo rimedojn, kiuj reguligas la vortfaradon, ne povis ne rimarki tiun sufikson **än**. Ni vidis, dank'al klarigoj ĉerpitaj ĉe Gaston Waringhien, kiel Zamenhof forĝis la sufikson **uj**. Bedaŭrinde tiu sufikso ne plu signifas **lando**, **regno**, **teritorio**, sed **entenilo**, **skatolo**. Tio kondukos al neatenditaj konsekvencoj.

A.- Ni donu ekzemplon pri la geografia landformado en Volapük.

Cl.- En tiu lingvo la radikoj ne havas precizan signifon kiel en esperanto. Ili akiras precizan signifon nur kiam ilin kompletigas precizigaj afiksoj. **Brit** por signifi **brito** devas ricevi la sufikson **el**: **Britel** do signifas **brito**. Por diri **Britio** oni devas uzi la landnoman sufikson **än**: **Britän**; por havi la adjektivon **brita** oni devas uzi la adjektivan sufikson **ik**: **Britik**. Resume, de la neŭtrala radiko **brit** Volapük formas per precizaj sufiksoj **Britel** brito, **Britän** Britio kaj **Britik** Brita.

A.- Vi rimarkis la diferencon, kiu ekzistas inter la volapüka kaj esperanta vortfarado. Ĝin ni bone povas kompreni, kiam ni ekzamenas la tabelon de la korelativoj, kiu verŝajne estas inspirita el Volapük. La elementoj **k**, **t**, **nen**, **ĉ**, **i**, **el**, **am**, **om**, **al** ne havas memstaran vivon. Nur ilia kuniĝo kreas memstarajn vortojn: kiam, tiam, neniam, ĉiam, iam, kaj tiel plu. Tio estas tiel vera, ke en esperanto la elemento **am** ne riskis aliajn kuniĝojn. Al la demando kiam, neniu sin riskus respondi: **infanam** aŭ **aŭtunam** aŭ **hodium**, kiel tio eblus en Volapük, por la signifoj **en la infaneco**, **en aŭtuno** kaj **hodiaŭ**. Por esperanto la finiĝo **am** ne estas memstara sufikso. Tamen ni povas ricevi ideon pri la volapüka vortfarado, kiam ni komprenas, ke ĝi similas al la vortfarado en nia tabelo de la korelativoj, kun la sola diferenco, ke la kunmetebraj elementoj ne estus limigitaj.

Cl.- Por reveni al la geografia vortfarado en Volapük ni reprenu alian landon Brazilo. Unue la radiko por tiu teritorio estis **Basil**, poste ĝi reprenis la literon **r** kaj iĝis **Brasil**. Al **Britel** brito respondas **Brasilel** brazilano; al **Britän** Britio respondas **Brasilän** Brazilo kaj al **Britik** brita

Geografia nomenklaturu, 8-a parto
Influo de Volapük
Claude Gacond, 289-a radioprelego, 1969.04.23 & 26

respondas **Brasilik** brazila. Kiel vi konstatas, tiu paralelismo ne ekzistas en esperanto. La esperanta strukturo ne permesas ĝin.

A.- La radiko **brit** en esperanto signifas la homon, kiu loĝas en iu teritorio, parolas iun lingvon, ktp. La radiko **brazil** nur difinas iun teritorion. En Volapük la radikoj **brit** kaj **brasil**, kiel la elementoj de nia korelativa tabelo, havas neniam memstarecon. Ni troviĝas antaŭ du sistemoj de aglutineco, antaŭ du lingvaj logikoj.

Cl.- Tion ne tuj komprenis Zamenhof. Ĝis la periodo de la unua universala kongreso li uzis la sufikson **uj** iom kiel la volapükistoj uzis la sufikson **än**. **Britujo**, **Brazilujo**, jen du formoj, kiuj ŝajnis al li logikaj. Fakte **Britlando** kaj **Brazillando** estus logikaj, sed **Brazilujo** estis vera idiotismo, tio estas peko kontraŭ la logiko de la lingvo mem. **Britujo** povas konveni, ĉar oni povas imagi **ujon**, kiu entenas la britojn. Sed oni ne povas imagi **ujon**, kiu entenas la teritorion **Brazilo**.

A.- La blinda imitado el alia lingva sistemo ofte kondukas al strangaĵoj. Ĉiam pri tiu temo ni ekzameni aliajn idiotismojn, kiujn Zamenhof forĝis sub la influo de la volapüka lingvo.

Cl.- La volapükaj **Bolivän**, **Nedän**, **Rilän**, **Sürän**, **Kanän**, kiuj fakte signifis Bolivlando, Nederlando, Irlando, Sirilando, Palestinlando, se oni volas fari komparon kun niaj propraj radikoj, estis tute logikaj en la volapüka sistemo. En esperanto ilia blinda imitado liveris sub la plumo de Zamenhof tiujn idiotismojn, kiuj hodiaŭ ŝajnas al ni lingvajn monstraĵojn: **Bolivujo**, **Holandujo**, **Irlandujo**, **Sirujo**, **Palestinujo**.

A.- Iom post iom la logika analizo de tiuj konstruoj komprenigis, ke ni troviĝas antaŭ idiotismoj. Sed fakte ekzistas alia idiotismo ankoraŭ pli idiota, kiun Zamenhof neniam malkovris, kaj kiu ĝis nun, laŭ nia scio, neniam estis kritikata.

Cl.- En Volapük la sufikso **än**, kiu signifis **lando**, **regno**, **teritorio**, ne nur servis al la forĝado de landnomoj, sed de aliaj negeografiaj konceptoj. Kaj ili estis tute logikaj. Per la radiko **fat** patro Volapük povis logike forĝi **fatän**, kiu signifas **patrolando**. Zamenhof provis imiti tiun vorton kun sia **patrujo**. Fakte li forĝis unu el la plej monstraj idiotismoj, kiuj ekzistas en la lingvo internacia.

A.- Kio logike estas **patrujo**. Ĉu ĉerko, kie kuŝas la patro post la morto, ĉu la lito, kie li dormas, ĉu eble lia hejmo? Ne, la vortaro instruas, ke estas la lando, el kie li devenas. Fakte Zamenhof estus devinta diri en esperanto **patrolando**, kiel en la germana **Vaterland**.

Cl.- La adeptoj de la landforma **uj**-sistemo, se ili estas konsekvencaj, devas ne nur rifuzi formojn kiel **Holandujo** kaj **Brazilujo**, sed la idiotismon **patrujo**. Sed fakte, estas en ilia medio, ke troviĝas la plej fidelaj defendantoj de tiu verŝajne stranga prunto el la lingvo Volapük.

A.- Fakte hodiaŭ la landforma **i**-sufikso estas la vera ekvivalento de la volapüka sufikso **än**. Pro tio en la medioj de SAT oni daŭre parolas pri **Brazilio**, **Kanadio** kaj **patrio**. Tiuj konstruoj estas absolute logikaj. **Brazilio**, **Kanadio** ne signifas la lando de la **braziloj**, de la **kanadoj**, kiel asertas kelkaj kritikantoj, sed **Brazillando**, **Kanadlando**. Kaj la vorto **patrio** estas bona solvo al la idiotismo **patrujo**.

Cl.- La botanikistoj nun evitas la sufikson **uj** profite al la sufiksoj **arb** kaj **plant**, ĉar ili komprenis, ke **kafujo** fakte nur povis signifi **kafopoto**. La signifo **kafoarbo** estas idiotisma. La geografoj malkovris, ke formoj kiel **Holandujo**, **Brazilujo** estas idiotismaj. Ili ankoraŭ malkovru, ke la vorto **patrujo** estas forlasenda erara konstruo. Tiam ni troviĝos antaŭ pli klara situacio. La geografia nomenklaturu gajnos en klareco.

Geografia nomenklaturu, 8-a parto
Influo de Volapük
Claude Gacond, 289-a radioprelego, 1969.04.23 & 26

A.- Sed eble homoj pensas, ke la idiotismoj alportas karakteron al nia lingvo. Tiam ili fideli al la formo **patrujo** kaj ekforĝu aliajn monstrojn, kiuj ege mankas en nia lingvo.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-